V-22484/1940 r N 17

No. 17 (29) DUA JARO 1 DECEMBRO, 1940

# Heroldo de Ĉinio

DUONMONATA GAZETO 中國報導半月刊

**ABONMANIERO** Ni ne fiksas abonprezon al tiu ĉi gazeto, sed kun danko akceptas laŭvolan donacon. Legantoj kiuj volas regule ricevi nian gazeton almenaŭ pagu la afrankon — sumon $0.25 aŭ 3 respondkuponoj por 1 jaro. Ni tamen esperas ke multaj s-anoj pagos pli por ke ni povu daŭrigi la regulan aperigon. Oni pagu al nia administracio aŭ prefere al nia peranto: S-ano Allan C. Shain, 37 Hopetoun Parade, Box Hill 11, Victoria, Aŭstralio.

Adreso de l' Red. k Adm:
P. O. Box No. 175,
Chungking, Ĉinio.
通訊處：重慶郵箱一七五號



# Generalisimo Parolas pri la Japana-Germana-Itala Alianco

## —Mesaĝo al la Ĉina Popolo—

La decido de Ĉinio rezisti ĝisfine k neniam submetiĝi al bruta forto frakasos la japanan esperon rapide fini sian kampanjon en Ĉinio per la helpo de Germanio k Italio, deklaras Generalisimo Chiang Kai-shek en sia mesaĝo al la ĉina popolo okaze de la ĉina Nacia Tago, oktobro 10.

Parolante pri la Japana-germana-itala Alianco, la Generalisimo asertis ke Ĉinio neniam rekonos la tiel nomatan "Novan Ordon de Orienta Azio" aŭ la "Novan Ordon de Pli Granda Azio," k avertis ke ajna lando rekonanta japanan suden-ekspansion, rimarkigis la Generalisimo. Aludante pri la ĉinia respondo al la tri-partia pakto, la Generalisimo anoncis la nacian pretecon fari ĉion laŭ sia povo por fiaskigi la japanan provon sklavigi la Orienton.

Li rememorigis la popolon ke la malamika ambicio estas unue konkeri Ĉinion, poste okupi la tutan Orienton k proklami hegemonion super la Pacifiko, k fine provi invadi la tutan mondon. La japana tiel nomata "Nova Ordo de Pli Granda Azio" signifas la submeton de ĉiuj pacifikaj landoj sub la japanan politikon de teri-

## VORTOJ DE LA REDAKCIO

PRO LA FINANCAJ KAJ ALIAJ MALFACILAĴOJ "HEROLDO DE ĈINIO" ĈESIS APERI JAM TRI MONATOJN EKDE LA SEPTEMBRO. DUM TIU TEMPO NI SUKCESIS AKIRI LA NECESAN SUBTENON POR LA DAŬRIGO DE NIA MODESTA GAZETO UNUFLANKE, KAJ REARANĜI NIAN TUTAN LABORON LAŬ LA KRITIKOJ KAJ POSTULOJ DE NIAJ LEGANTOJ ALIFLANKE. LA ĈINA ESP-MOVADO SUFIĈE DISVASTIĜAS LASTATEMPE MALGRAŬ LA MALFAVORAJ DUMMILITAJ CIRKONSTANCOJ, KAJ NI DO HAVAS LA RAJTON ESPERI KE ANKAŬ NIA GAZETO ATINGOS PLI KONTENTIGAN SUKCESON EN LA VENONTA JARO PER LA SIMPATIA SUBTENO DE NIAJ EN KAJ EKSTERLANDAJ LEGANTOJ.

"gvidantecon en Pli Granda Azio" iam pentos tian agon. "Ajna interkonsento konkludita kun Japanio influan a la Orienton k opoziciata de la ĉina popolo havos nur tian efikon kian interkonsento inter la pupoj en Nanking k iliaj mastroj —nura paperpeco," diris la Generalisimo.

Japanio nun profitas de la brita k franca pozicioj por ekspansiigi la sferon de sia "Nova Ordo" en "Novan Ordon de Pli Granda Orienta Azio" por faciligi sian toria pligrandigo k ilian agnoskon pri japana mastreco en Azio. Sed Ĉinio estas la plej antikva k plej granda lando en la Oriento. Sen Ĉinio, ne estos Oriento. Precize pro tio Ĉinio ne evitos la respondecon kiel la avangardo de stabiligita Orienta Ordo.

La Generalisimo rediris ke la celo de la ĉina rezistmilito— la restarigo de la politika k teritoria integreco de Ĉinio k internacia justeco k mondpaco — devos esti atingita, antaŭ ol ĝi lasos siajn armilojn.

Parolante pri ĉina perspektivo, la Generalisimo komentis: "Mi iam diris, 'Kiel ajn ŝanĝiĝos la internacia situacio, ĝi estos favora al nia rezistmilito.' Tio estas ĉar ni ĉiam tenas memdependan k memfortigan sintenon en nia batalo. La lastatempa pliiĝinta fremda helpo al Ĉinio k samtempa premo kontraŭ Japanio konfirmas mian antaŭdiron. Tamen, la plej granda signifo de tiu mia antaŭdiro konsistas en la fakto, ke la internacia situacio ĉiutage proksimiĝas al tiu sama bazo, sur kiu kuŝas la celo de nia rezistmilito."

Ĉinio estas destinita sukcesi en sia historia misio de nacia rejunigo, deklaris la Generalisimo, kiu konsilis al la nacio batali ĝisfine malgraŭ la internacia situacio.

Aliaj elstaraj punktoj de la mesaĝo estas:

Je tiu ĉi tago kiam la ĉina rezistmilito eniris sian kvaran jaron k kiam kataklismaj ŝanĝoj okazas en la Oriento k la mondo, la nacio, rememorante la Nacian Tagon, devas duobligi siajn klopodojn por nacia rekonstruado.

La celo de la ĉina revolucio k nacia rekonstruado estas nacia libereco k egaleco interne k stabileco en la Oriento k vera mondpaco ekstere.

(*daŭrigota sur apjo 202*)

ĴUS APERIS

NOVA VIVO

(DU NOVELOJ)

ELĈINIGIS

VENLO FON

REZO: U$0.10

ŭ 2 resp.-kuponoj.

MENDU ĈE

HEROLDO DE ĈINIO

# Kiel Estas en la Gerilaj Regionoj?

Tiuj restantaj postfronte ĉiam havas strangan imagon pri gerilaj regionoj. Sed se vi vizitas la t.n. okupatan areon persone, strange impresos vin multaj mirindaĵoj kiuj jam fariĝis ordinaraj tie.

La malamiko, provante elloki ĉiujn niajn geriltrupojn el iliaj bazoj de rezisto, furioze atakas al la granda ebenaĵo de Hopei-provinco. Kelkaj opinias ke geril-batalo estas bona taktiko, sed sur la granda ebenaĵo, ni ne provas efike apliki tian taktikon por kontraŭi la premon k atakon de la malamiko. Tamen, la grandega forto trovebla ĉe la vasta popolamaso, elfosis ĉie larĝajn k profundajn tranĉeojn, k tiel transformis la ebenaĵon en plej komplikan regionon, kie la malamiko sentas tian saman doloron kian ili gustumas en montoza regiono.

S-ro Smith Reuter-korespondisto antaŭ nelonge alvenis la regionon de Liuliang-Montaro. Tuj post sia alveno, ne trovis ajnan diferencon inter la popolamasoj tieaj k la postfrontaj, krom ke la antaŭaj estas pli malnovmoraj ol la lastaj. Sed vivante inter ili k konversaciante kun la popolamasoj, li trovis ke eĉ maljunuloj povas eldiri kial albatali la japanojn k kiel savi Ĉinion, k li ne povas ne admiri efikecon de la amas-organiza laboro, kion lanĉis la naciisavaj organizoj, k la rapidecon de la progreso de popolamaso sub la malamika kanonfajro.

Tial post sia observado en la Pu-urbo, okcidenta Shansi-provinco, li skribis sur la Popola Ĵurnalo kiel jene:

"La popolamasoj de Shansi Provinco, per neŝanceligebla kuraĝa k sindona volo defendas la sendependecon k liberecon de sia nacio. Ili estas la modelo de rezistado por la tuta Ĉinio k ankaŭ la tuta mondo. Mi volas esprimi en la momo de angloj nian varman simpation al vi k esperas ke via rezistado venkos."

Antaŭe, li ne "facile" kredis la fakton pri la fervojo-detruado de ĉinaj geriloj k opiniis ke tio estis nur "fanfaronado" de ĉinaj ĵurnaloj. Sed poste, sekvante iun geriltaĉmenton k vidinte mem la fervojo-detruan laboron, li ekkonis la kuraĝon de ĉinaj geriltaĉmentoj k la timemon de la malamiko k la perfiduloj. Tio preskaŭ tute kontraŭas al lia pasinta imago.

Fakte, la fervojo-detrua laboro ne nur estas ĉiutagaĵo de gerilaj taĉmentoj, sed ankaŭ la popolamaso ĉiam tion faras kune kun la armeo aŭ per si mem. Mi loĝis en iu monta arbaro for de la fervojo je ĉirkaŭ 70 kilometroj, k intervoje baris malamika taĉmento por protekti komunikadon. Tamen mi ĉiam vidis la kamparanojn transporti relojn longajn je sep metroj trans malamikan blokadlinion k trairi 70 kilometran malebenan montvojon, por ilin transdoni al nia registra maŝinuzino kie ili ricevos rekompencon, k kie reloj transformiĝas en antijapanajn pafilojn k kanonojn.

Kvankam la kultura nivelo de tiu regiono estis tre malalta, tamen nun ili jam lanĉis demokratan movadon. Popolanoj elektas reprezentantojn por esprimi sian volon al la registaro. Preskaŭ ĉiuj vilaĝanoj partoprenas ian nacisavan asocion. La japanoj pensis ke ĉinoj estas manĝemaj k mallaboremaj, k pro tio ili provis trompi k allogi popolanojn per sukeraĵoj k enladigitaj manĝaĵoj. Sed la ĉina popolo jam leonsimile hurlas. Ekzemple, en Chaocheng, urbo de suda Shansi-Provinco, la nombro de anti-japanaj volontuloj alproksimumiĝas dudek mil, malgraŭ ke ĝia loĝantaro nur nombriĝas je cent deknaŭ mil. Krom sia kamparlaboro, la restantaj popolanoj ofte detruis fervojojn, kaŭzis maltrankvilon al la malamiko k ilin trompe turmentis. Se estis oportune, ili donis frapojn al la invadantoj.

Antaŭ nelonge, kiam la malamiko ekkomencis ofensivon al nia fronto tiea, la popolanoj kunlaboris kun sia registaro k armeo. Ili organizis kamparanajn geriltaĉmentojn, uzante siajn terkulturajn ilojn kiel batalilojn. Ili albatalis ne nur la malamikon, sed ankaŭ la perfidulojn. Antaŭ kelkaj tagoj la gerila taĉmento de Hungtung kamparanoj eĉ prezentis al nia registaro japaninojn, kiujn ili kaptis dum batalo.

Homoj restantaj postfronte, ĉiam suferas de la aerbombardo de la malamiko k de malsufiĉo de nutraĵ-provizo. Sed tie, en la gerila regiono, en radio de 1 kilometro for de la malamiko, ekzistas nia antijapana registaro. Ĝi estas kaŝita en kamparana hejmo. Krome kelkaj viroj estas ja niaj maskitaj kamaradinoj. Krom sia kutima laboro, ili vizitis ĉiujn vilaĝojn sub malamika okupo, k gvidis la vilaĝanojn fari ĵuron laŭ la nacia interkonsento. Tiel, per fervora respondo al la nacia spirita mobilizo, ili esprimis la elkoran subtenon al nia nacia gvidanto Generalisimo Chiang Kai-shek.

La taktiko de evakuo estis bone plenumita tie. Kiun lokon la malamiko okupos, tiu loko jam fariĝis senviva regiono, kvankam en ordinara tempo ĝi estis prospera. Tiu-ĉi metodo gajnis grandan sukceson kontraŭ la malamiko. Ekzemple, kiam la malamiko okupis la Ducikiuguon, vilaĝo tri kilometrojn okcidente de la Siaoyi urbo en Shansi Provinco, ili trovis nur kelkajn melonojn por manĝi post malsato tra tuta tago. En Dahsuan k Puhsian, ili estis devigitaj manĝi branon k hundojn, k eĉ buĉis siajn ĉevalojn por manĝaĵo. En Shungch, post la okupo de la malamiko, ili devis trairi kelkcent kilometrojn da malebena montvojo por transporti provizaĵon kiun ili bezonas, k eĉ por elĉerpi akvon el putoj, ili devis uzi akvujegon, ĉar tie jam neniu akvobarelo estis trovebla. Plie, la Shansi provinco estas fama karboprodukta regiono, sed la malamiko ĉiam sentas mankon de brulaĵo post okupo.

Pro tio la malamiko ofte devigite sin retiris el sia okupita areo. Tion oni eble sentas nekredebla. Sed tio estis fakto.

Kvankam la plejparto de la kamparaninoj k junulinoj ankoraŭ konservas la tradicion de pied-volvo, ili ĉiuj scipovas fari agitan paroladon sur la estrado antaŭ miloj da popolanoj. Iĭi aniĝis al la Virina Nacisava Asocio k senĉese kontraŭbatalas virojn kiuj ilin premadis. En nemalmultaj lokoj virina sindefenda korpuso estas organizita. Tiel bone kiel la viroj ili deĵoris gardstare ĉe vilaĝa enirejo k pridemandis vojaĝantojn. Multfoje per aresto de perfidulo ili montris sian meritoplenan servon. Ili scias kiel batali por siaj rajtoj kiel civitanoj. Ili postulas la rajton de voĉdono k lanĉis la voĉkonkursan movadon en la vilaĝo. En la lim-regiono de Shansi, Hopei k Charhar provincoj, la bofratinoj k fraŭlinoj jam anstataŭis la onklojn k bofratojn kiel vilaĝestroj.

Knaboj malgraŭ sia juneco jam ricevis sufiĉe da antijapana edukado en la lernejoj, Knabkorpusoj aŭ Knabo-Nacisava-Asocioj. Ili scias kial k kiel ni albatalas la japanajn invadantojn k povas klarigi la teorion de unuecfronto k rezistado. Multaj buboj havas nur dek-du aŭ -tri jarojn, tamen ili partoprenis la mortspitajn k gerilajn taĉmentojn. Ili laboris kiel dramludantoj, servsoldatoj, eĉ iuj kiel batalantoj sur la fronto. Se vi ilin demandas: "Ĉu vi ne timas la japanajn diablojn?" "Kial ni timas la diablaĉojn?" Ili certe respondos svingante sian polekson kun maniero malestima. Eĉ knabinoj, kiuj havas nur dekkelkajn jarojn, volonte kondukas tian suferan vivon, kian plenkreskulo ne povas facile elporti. Sed ili neniam plendis.

Estas vere, vi povas ĉie vidi staton de progreso kontraŭ malprogreso en la gerila regiono. Ekzemple kiam iuj patroj fariĝis perfiduloj laborantaj por la malamiko, iliaj filoj k filinoj ilin forlasis senhezite, k ilin opozis kiel malamikon decideme k senpente por dediĉi sian lojalecon al sia nacio k lando.

Ĝenerale, la kamparana vivo estas mizera, precipe en regionoj proksimaj al la malamikaj linioj. Tie la invadantoj per rekrutiga, senpaga servigo k ceteras barbaroĵoj premadas k sklavigai la kamparanojn por igi ilin helpi la sia invado. Sed kiam niaj gerilanoj alvenis nokte, ili tuj sin stimulas, helpas al nia batalo k en la detruado de la aŭto- aŭ fer-vojoj, kiujn ili konstruis antaŭe sub la premo de malamiko. Ili ja tute ne timas la barbarajn invadantojn.

Martiroj, kiel tiuj en mitoj, estas multaj en gerilaj areoj. En Chaocheng, urbo sur Tatung-Puchow fervojo, troviĝis S-ro Guo k lia filo. Ili estis batitaj de malamikaj soldatoj ĝis la korpoj estis tute kontuzitaj, la dentoj estis forigitaj, k la haroj estis eltiritaj. Sed ili tute ne subiĝis ĝis sia morto. En Giesiu, urbo norde de Chaocheng ankaŭ sur la Tatung-Puchow fervojo, S-ro Yang Fengming estis arestita de la malamiko k liaj okulgloboj estis elŝiritaj, sed li ne cedis k kriegis ĝis sia morto: "Faligu la japanan imperialismon!" Miloj da tiaj kuraĝaj herooj tiel brave renkontis morton por sia patrio!

La japanaj invadantoj ja estas senhomecaj bestoj. Ili seksperfortis ĉiujn virinojn, kien ili alvenis, eĉ la plej junajn k maljunajn senescepte. En Wusiang urbo de Shansi Provinco, dekdu virinoj estis perfortitaj laŭvice de japanaj brutoj k fine ili fotis la suferantinojn senvestigitaj. En Norda Honan Provinco k Suda Hopei Provinco, la malamikoj ofte devigis virinon koiti kun sia patro aŭ filoj por ilin amuzi. Iu juna vilaĝanino en Chaocheng mortis de japana perfortado en iu valo..........

Lastatempe la malamiko provas narkoti k sklavigi niajn nacianojn per politika trompo k kultura propagando. Mi vidis 21 perfidulajn ĵurnalojn, ĉiuj estas plenigitaj je absurdaj diroj, plej malnoblaj rakontoj k aŭ obscenaj fotografaĵoj. Ĉu estaĵoj havantaj homecon povas tion fari?

Sed la diversaj intrigoj, kiujn provis la malamiko jam tute fiaskis. Ekonomie ĝi ne povas ŝanceli la ĉinan nacimonon, milite ĝi ne povas forbalai la gerilojn, kulture la trompo estas travidita de niaj popolanoj. La malamiko malfortiĝas k regresas en la daŭro de la milito. Antaŭe la bravaspektaj "imperiaj soldatoj" vestis sin per luksaĵo, manĝis rizon kun enladigita viando. Sed nun ili devis vesti sin per ĉifonita uniformo k manĝi rizkaĉon eĉ putran hundviandon. Ĝuste pro tio multe da pupaj armeoj kapitulacias al nia armeo. Antaŭ nelonge la malamiko mobilizis taĉmenton da pupaj trupoj por gardi la Ginchengbao-Leuchun zonon, okcidente de la Linfen urbo. Komence la pupaj trupoj venis al ni individue, poste ili kapitulaciis tuttaĉmente. Rilate al la japanaj soldatoj, multaj el ili sinmortigis aŭ dizertis dum batalo pro la turmentado de gerilaj atakoj. Ili timas niajn gerilojn pli ol sian imperiestron.

Diboĉo, hejmsopiro, militenuo, antimilitismo, sinmortigo, kapitulacio k dizerto—jen la ideoj kiuj plenigas k preskaŭ ŝvelrompas la cerbon de la japanaj militaristoj.

(Noto [1]) La interkonsento entute havas 12 artikolojn kiel jene:

(a) Ne kontraŭi San-Min-Ĉu-I (Tri Popolaj Principoj).
(b) Obei ordonojn de nia registaro.
(c) Ne perfidi la intereson de nia patrio.
(ĉ) Ne fariĝi servutulo al la malamiko k perfiduloj.
(d) Ne partopreni ajnan perfidulan organizon.
(e) Ne servi al la malamiko k perfiduloj.
(f) Ne gvidi vojojn por la malamiko k perfiduloj.
(g) Ne spioni por la malamiko k perfiduloj.
(ĝ) Ne labori por la malamiko k perfiduloj.
(h) Ne akcepti la bankbiletojn de la malamiko k la pupa registaro.
(ĥ) Ne aĉeti ajnajn varojn de la malamiko.
(i) Ne vendi manĝaĵon k ajnajn materialojn al la malamiko.

(*Trad Siaoĉen?*)

# Japanaj Homperdoj Taksiĝis je 1,644,988

Depost la eksplodo de la milito Julio 7, 1937 ĝis majo, 1940, la japanoj suferis 1,644,688 mortigitojn k vunditojn, laŭ oficiala raporto.

Dum la trijara periodo, la japanoj sendis 51 diviziojn k refortigojn, entute 2,800,000 virojn. La japana forto restanta en Ĉinio en majo, 1940, estis taksita je 35 divizioj el 1,150,000 viroj, ne inkludante la naŭ diviziojn garnizonantajn Manĉurion.

Japanoj iom post iom pliigis siajn batalunuojn en sia invado al Ĉinio depost la komenco de la milito ĝis februaro, 1940, kiam la invadanta forto iom reduktiĝis de la zenito de 1,200,000 ĝis 1,150,000 viroj en la tri postaj monatoj. La japanaj fortoj ĉe la tempo de la ĉina retiriĝo el Nanking en decembro, 1937, estis taksitaj je 25 divizioj aŭ 800,000 viroj. Tiu ĉi nombro pliiĝis ĝis 29 divizioj aŭ 950,000 viroj ĉe la tempo de la batalo de Hsuchow. Dum la batalo de Hankow, la japanoj havis 31 diviziojn el 1,000,000 viroj en Ĉinio, kiuj estis refortigitaj ĝis 37 divizioj el 1,200,000 viroj en la periodo inter januaro, 1939 ĝis februaro, 1940.

Japanaj homperdoj estis taksitaj je 256,200 en la periodo inter la komenco de la milito ĝis ilia okupo de Nanking. En tiu ĉi periodo japanaj militmortigitoj k vunditoj okupis 32% de la tutaj fortoj. La procentaĵo de japanaj homperdoj estis malpli alta dum la periodo de la batalo de Hsuchow, kiam 198,300 viroj aŭ 21% de la tutaj batalfortoj mortiĝis aŭ vundiĝis. Dum la batalo de Hankow, japanaj homperdoj, kiuj estis 25% de la 1,000,000 militpartoprenantoj, estis raportitaj je 246,590.

Japanaj homperdoj estis plej pezaj dum la periodo de januaro, 1939 ĝis februaro, 1940, kiam 40% de iliaj tutaj batalfortoj, aŭ 486,649 viroj, mortiĝis aŭ vundiĝis en Ĉinio. En la tri monatoj inter februaro k majo, 1940, japanaj homperdoj estis taksitaj je 118,249 aŭ 10% de la tutaj batalfortoj. Tiu ĉi malalta procentaĵo estis kaŭzita ambaŭ de la kompara kvieteco ĉe la frontoj k la mallonga daŭro de tiu ĉi periodo de la milito.

Ekskludante la 540,000 homperdojn inter siaj helpaj unuoj, la japanaj regulaj batalfortoj suferis entutan homperdan nombron de 1,304,988 (mortigitoj k vunditoj) dum la unuaj tri jaroj de la milito. Tiu ĉi homperda listo reprezentas 47% de la tutaj trupoj k refortigoj senditaj al Ĉinio dum la periodo revuata. Alivorte, unu el po du soldatoj senditaj al Ĉinio dum la pasintaj tri jaroj estas aŭ mortigita aŭ vundita!

Tri ĉefaj kampanjoj k 277 gravaj bataloj okazis dum la unua stadio de la milito ekde la komenco de la milito ĝis la batalo de Hankow en la vintro de 1938. La dua stadio de la milito komencanta de januaro, 1939, k finiĝanta en majo, 1940, estis distingita per ses ĉefaj bataloj, 194 gravaj batalegoj, 6,718 lokaj interatakoj k 5,009 gerilaj luktoj.

Japanio havas batalforton de 2,500,000 viroj. Sed ĝis nun ĝi povis mobilizi nur 52 diviziojn da viroj por aktiva servo. Depost la komenco de la milito, ĝi jam varbis 700,000 freŝajn rekrutojn, el kiuj la plejparto estis sendita al Ĉinio kiel refortigoj aŭ replenigoj. La japanan malfacilecon subteni sufiĉe grandan armecon pliigas la fakto ke ĝi devas teni garnizonan forton de ses divizioj hejmlande, naŭ diviziojn en Manĉurio k du aliajn en Koreio k Formoso.

(trad. Minoo.)

## Por Pli Bone......Tranĉi la Orelojn!

Hazarde mi legis kelkajn liniojn el japana esperanta gazeto, nomata «Tempo», kiuj sonas jene:

«Eĉ al ni, bonaj, silentemaj kaj fidelaj, eŭropaj potenculoj ĉiam insultas, en la okazo de la nuna konflikto en Ĉinujo. Sed nia lando jam lernis tuton pri ilia ruza ago, kaj aranĝis municion por venki maljustan rajton.........La ĉina konflikto estas tio.

«..........Tiuj, kiuj mensogas al ni, Japanujo, perdos sian starpunkton. Tiuj, kiuj harmonie kunhelpos nin, prosperos en orienta Azio. Ĉar nia Japanujo estas bona kaj vera gvidanto de Azio, kiel Dio en ĉielo..........»

Nu, kion vi diras? Ĉu ne estas tre belsone tion paroli per la lingvo internacia de Zamenhof?..........

Kiuj ŝatus studi pri la esperanta elparolado, tiuj, almenaŭ unu minuton, aŭskultu la japanan «samideanon», la parolanton de «Tempo»!

Krome, al la tuta kolegaro de «Tempo», kaj al la similaj «samideanoj» en Japanio, mi proponas: se ankaŭ tiuj hazarde iam volus kanti «La Esperon», preferu laŭ jena modo, ekzemple:

Nur al glavo sangon soifanta
Ni la homan tiras familion;
Al la mond' enue militanta
Ni postulas plian municion!

Ĉar, tiel estus multe pli bone..........por tranĉi la orelojn!

([illegible])

# Testamento de D-ro Sun Jat-Sen al Sovet-Unio

La 11a de decembro estas la 75a datreveno de la naskiĝo de D-ro Sun Jat-sen, la mortinta fondinto de la Ĉina Respubliko kaj la Ĉina Naciista Partio (Kuomintang). Por rememori tiun revolucian giganton ni esperantigis jene lian testamenton-leteron al Sovet-Unio ĉe la momento de lia morto antaŭ 15 jaroj. En tiu letero D-ro Sun tiom senkaŝe montris sian plej sinceran, ardan amon kaj fidon al la granda "Unio de la liberiĝintaj respublikoj". Tiu ĉi skribaĵo sendube fariĝos estonte unu el la plej valoraj kaj neniam forgesotaj historiaj dokumentoj por la ambaŭ landoj kaj por la tuta homaro.

Al la Centra Plenuma Komitato de la Unio de Sovetaj Socialistaj Respublikoj.

Karaj Kamaradoj:

Mi suferas ĉi tie de nekuracebla malsano; mia koro nun turniĝas al vi, al mia partio kaj al la estonto de mia lando. Vi estas la gvidantoj de la liberiĝintaj respublikoj, kiu estas la vera monda heredaĵo lasita de la senmorta Lenin al la subpremataj nacioj, kaj per kies helpo la rifuĝantoj sub la imperiismo defendos sian liberecon kaj sin emancipos el la internacia sistemo bazita sur la sklaveco, milito kaj egoismo de la antikva epoko. Kion mi forlasas estas Kuomintang, la Ĉina Naciista Partio. Mi esperas ke Kuomintang kunlaboros kun vi en sia historia tasko liberigi Ĉinion kaj la aliajn invaditajn landojn el imperiismo. La sorto destinis al mi forlasi mian nefinitan laboron kaj ĝin transdoni al tiuj, kiuj singarde observas la Kuomintang-doktrinon kaj instruojn kaj unuigas miajn verajn samideanojn. Tial mi jam instrukciis al mia partio antaŭenpuŝi la naci-revolucian movadon por ke Ĉinio sin liberigu el la jugo de duonkolonio en kiun puŝas Ĉinion la imperiismo; por atingi tiun ĉi celon mi jam instrukciis al mia partio longdaŭre kunlabori kun vi. Mi estas konvinkita ke via Registaro ankaŭ daŭrigos la helpadon jam donitan al mia lando. Karaj Kamaradoj, ĉe mia adiaŭo kun vi, mi volas esprimi mian ardan esperon ke baldaŭ fariĝos tagiĝo, kiam Sovet-Unio akceptos kiel bonan amikon kaj aliancanon la potencan, prosperan kaj sendependan Ĉinion, kaj ke la du landoj marŝos man-en-mane por gajni la venkon en la granda lukto por la liberigo de la tutmondaj subpremataj nacioj.

Kun frataj salutoj!

Sun Jat-sen

## DANKE NI KVITANCAS

| | | | |
|---|---|---|---|
| 89. | S-ano Ed. Dance (Latvio) | r. k. | 1 |
| 90. | S-ano J.M. Masu (Argentino) | ,, | 2 |
| 91. | S-ano J.A. Forssell (Usono) | U. $ | 1 |
| 92. | S-ino Alice V. Morris (Usono) | Ĉ $ | 36.36 |
| 93. | S-ano J.L. Spence (Usono) | r. k. | 5 |
| 94. | S-ano R. Readnead (Kanado) | Ĉ $ | 13.33 |
| 95. | S-ano B. Klakočar (Jugoslavio) | r. k. | 4 |
| 96. | S-anoj R.R. Bonesper kaj G. Gabor (Usono) | Ĉ $ | 17.39 |

(daŭrigo de paĝo 198)

Japanaj militaristoj estas la malamikoj de Ĉinio. La invadpolitiko de Japanio estas mortiga kontraŭulo de la San Min Ĉu I. Timante ke Ĉinio fariĝos forta k prospera, Japanio depost la 1911 Revolucio ripetfoje intervenis k atencis al ĉinaj unueco, ekonomia rekonstruado k nacia defendo. Tio ĉi estis pli rimarkebla post la komenco de la Norden-Ekspedicio de la Naciista Armeo en 1926. De septembro 18, 1931, ĝis julio 7, 1937, Japanio lanĉis grandskalan invadon al Ĉinio. Nia rezistmilito estas tial samtempe milito de venĝo k milito por realigi niajn naciajn aspirojn.

Ĉe la nuna kriza momento, la armitaj batalantoj k civilanoj de la nacio devos emuli la spiriton de la martiroj de la 1911 Revolucio, la spiriton de la Usona Revolucio, la Rusa Oktobra Revolucio k la turka batalo por sendependeco.

Estas vere ke la ĉina rezistado jam eniris eĉ pli malfacilan periodon sed niaj eksteraj cirkonstancoj estas multe pli bonaj ol tiuj dum la 1911 Revolucio pro la fakto ke ni batalas kontraŭ malamiko kiu estas ĉirkaŭata de malamikaj potencoj k kiu estas jam sur la rando de disfalo. Ĉiuj justamaj landoj de la mondo estas amikoj de Ĉinio. Ili esperas ke estos sendependa k prospera Ĉinio en Azio, ĉar ili scias ke triumfa Ĉinio post la milito faros gravajn kontribuojn al reciproka helpo k kunlaboro en monda ekonomio k al vera internacia paco. Tial, la demando estas ĉu ni mem posedas tian fidon k ĉu ni klopodos por tiu celo.

"Je oktobro 10, 1937, mi diris: 'Tiu ĉi milito ne finiĝos en unu aŭ duona jaro.' Hodiaŭ, nia batalo jam fariĝis ĉenero de la monda problemo. Ni proksimiĝas al fina likvido. Ni devas tial konscii, ke la nuna momento postulas pli grandan kuraĝon k persistecon k pliajn oferojn por la samtempa plenumado de nia duobla tasko.

## NOVA TASKO

*(Noveloj)*

ELĈINIGIS
CICIO MAR

80 paĝoj ilustrite
U$0.30 (inkluzive afrankon)
Mendu ĉe

**VERDSTELO LIBREJO**

P. O. Box 78, Chengtu,
Szechwan, Ĉinio.


"Ni devas (1) unuigi nian volon, firmigi nian forton k starigi solidan politikan fundamenton; (2) disvolvi industriajn entreprenojn, pliigi produktadon k intensigi niajn esplorajn k kreajn klopodojn por starigi la fundamenton por solida k sendependa ekonomio; k (3) daŭrigi niajn klopodojn por konstrui fortan armeon, akceli industriojn, plibonigi niajn armilojn k disvolvi komunikilojn por nacia defendo.

"Mi esperas ke la armitaj batalantoj k civilanoj, precipe gvidantoj en diversaj sociaj rondoj, konscios ke la respondeco por rekonstrui sian patrolandon, la Orienton k la mondon kuŝas sur la ŝultroj de la nuna generacio. Neniu povas eviti tiun ĉi devon."

*(resumis Mincz)*

## EL LETEROJ DE NIAJ LEGANTOJ

**S-ano G. Viena, Brazilo:**

Mi estas regule ricevanta bonegan «Heroldo de Ĉinio»-n. Mi dankas al vi tiun valoran donacon, kies legado estas ĉiam agrabla al mi, same kiel al ĉiuj lokaj klubanoj, Ĉiuj deziras kore la triumfon de la Justeco per la venko de Ĉinio.

**S-ano O.T., Norvegio:**

Mi ricevis la alsenditan gazetpaketon kaj la karton, pro kiuj mi estas tre danka.

La karto estas datita la 21an de junio kaj venis ĉi tien komence de aŭgusto, do la cirkonstancoj ne tiom longega tempo. Estas tre interese ricevi skribaĵojn de tiom malproksime nun kiam estas ne bonaj poŝtkomunikoj.

Vi demandas pri la situacio de mia lando. Responde al tio mi povas diri ke estas tute kviete en Norveglando kaj ke ni laboras kiel antaŭe. Kompreneble estas malfacila tempo por Eŭropo, sed ĉiuj kulturas la esperon pri pli pacaj tempoj post ne tro longe.......... Per la gazetaro mi kun intereso sekvas la okazaĵojn en via granda lando.

**S-ano P. Oki, Anglio:**

La eŭropa milito bedaŭrinde reduktis la eblojn vaste dissendi vian valoran ĵurnalon, kaj oni devas atendi ĝis Anglio ree estos en paco antaŭ ol la perspektivo pliboniĝos. Mi kompreneble daŭrigos mian propagandon por via afero, kvankam britoj nun havas siajn proprajn promilitajn zorgojn kaj ne tre atentas pri via milito en malproksima Azio.

En la angla lingvo aperis nur malmultaj libroj pri moderna militanta Ĉinio, kaj sen viaj presaĵoj mi scius malmulton pri via subteninda lukto.

**S-ano Ed. Dance, Latvio:**

Akceptu flamajn salutojn el ĵus liberiĝinta kaj al la granda familio de Sovetaj respublikoj aliĝinta lando——Soveta Socialista Latvio! Estu via batalo kontraŭ imperialistaj invadantoj same sukcesa kaj finiĝu ĝi baldaŭ per definitiva venko de la brava ĉina popola armeo! Tion plej sincere kaj fratece bondeziras tuta liberiĝinta latva popolo.

Ĝis la fino de junio ĉijara mi ankoraŭ ne havis eblecon eluzi enhavon de ĉinaj gazetoj en Esperanto. Mi sukcesis represigi en PTT-faka revuo nur unu artikolon el «Voĉoj el Oriento» pri ĉinaj poŝtistoj en milito. Nun por tiuj represoj malfermiĝas vasta gazetaro de Soveta Latvio, ne plu dependanta de siaj antaŭaj «patronoj»—— Anglio kaj Francio——kaj tial libere disponanta pri sia gazetaro.

## KORESPONDO

S-roj Jose dos Santos e Silva, Jose Joaquim Rodrigues kaj Antonio Pereira Simoes, Santiago de Cacem, Portugalio, deziras korespondi kun tutmondo per I. P. aŭ leteroj. Skribu multnombre! Respondo nepra!

F-ino L. L. Ling, ĉe la Redakcio de «Heroldo de Ĉinio», P. O. Box 175, Ĉinio, deziras ricevi ilustritajn gazetojn, I.P.K., P.M. Interŝanĝe mi sendas ĉinajn P.M., I.P.K. k fotojn.

S-ano Ŝiung Ĵutung, "Ha Lu", Lu Hsien, Szechuan Provinco, Ĉinio, deziras korespondi kun ĉl. esp-istoj, precipe kun civilinĝenieroj. Respondo garantiata.

K-do Ŝu Fosen, ĉe Korespondа Esperanto-Lernejo, P. O. Box 175, Chungking, Ĉinio, deziras korespondi k interŝanĝi esp. librojn, gazetojn k ilustraĵojn kun ĉl. gek-doj.

K-do Lok Chih-hoi, P.O.Box 164, Kukong, Kwangtung, Ĉinio, 24jara telegrafisto, deziras korespondi kun ĉl. gejunuloj precipe sovetiaj interesiĝantaj pri arto k elektro-scienco. Mi deziras akiri anglajn librojn pri elektro-scienco, rusajn gazetojn, esp. eldonaĵojn, fotojn, P.M., P.K. ktp. Tuja respondo garantiata.

LJU HO-Z

# ŜOSEO

## I

En montaro, kiu kuras kiel ĉeno,
Kiun kovras dornoj kaj hommanĝaj herboj
(Depost kiam la inĝeniero strektis
Sangoruĝan la linion sur landkarton),
Da dekmiloj gejunuloj verŝis are
Sian energion viglan kaj valoran
Sur la pinton de pioĉo tage-nokte.
Ili ŝvitis por elturni senripoze
Humtavolojn kaj eltiris firmajn rokojn
De vetero muelitajn de pratempo.
En helika malrapido pioĉadis
Ili col-postcole ĝis longlongaj metroj!
Dum la tuta jaro ili enspiradis
Ĉiam la aeron de variaj gradoj:
En la tagoj frostaj ili surblovadis
Haŭtfenditajn manojn per la varma spiro;
Kaj en ardaj tagoj ili viŝis ŝviton
For de l' frunto per la brako laciĝinta.

Kiom da personoj ĉesis korbatadi
En laboro tiel peza, suferiga!
Per pioĉoj samaj oni devis fosi
La montdorson por eternan liton doni!
Ili nur ĝemveas kaj singultas vane,
Ne povante treti per siaj krudaj plandoj
La ŝoseon iam de si konstruota.

Sed jam la alia vico de junuloj
Tuj plenigas per si la vakitajn lokojn,
Kaj ekprenas la pioĉojn postlasitajn,
Luktas kun la frost' kaj malvarma rizo;
Dum edzinoj de junuloj jam mortintaj
Apudvoje viŝas for funebrajn larmojn.

Fine ŝvito, sango de junuloj niaj
Kaj larmeroj de iliaj la edzinoj
Miksiĝintaj en argilon ja sukcesas
Glatpavimi la ŝoseon col-postcole
Ĝis dekmiloj da longlongaj metroj foren,
Nun jen sur ĉi tiu granda arterio
Jam trakuras fulme kaj for malaperas
Aroj da aŭtomobiloj bru-tertreme,
Eklevante post si polvkurtenon grizan,
Kiu, ho, vualas la mizerajn tombojn
Jam tegitajn per la longaj verdaj herboj,
La tombejon de l' viktimoj pereintaj!

## II

De la frumateno ĝis vesper' malfrua
Bovoj trenas sur ŝoseo ĉarojn plenajn
De plugiloj, garboj aŭ aliaj aĵoj,
Posttirante du radsignojn glatregulajn,
Kiuj interligas sorton kamparanan,
Dum agrable trilas kanto primitiva.
En mateno frua ĉe la vojoflanko
Avo svingas manon al la nepo sia,
Dum ĉi tiu adiaŭas perrigarde.
Poste li ensaltas en la grandan ventron
De muĝanta la skrab' kaj iras urbon.
Kaj vespere revenante el la urbo,
Por la nepo av' alportas donacaĵojn,
Kiel lornon, tambureton aŭ similajn.
Kiam venas la sezonaj festotagoj,
Eĉ vidvinoj vestas sin per buntatlaso
Kaj vizitas urbon kun la orfo sia
Kune kun najbaroj per la aŭtobuso
Por la tago ĝui urban bruon gaje.

## III

Venas el la urbo famo pri milito.
En la noktomezo traglitas for trupoj,
Veturiloj kuras kun lavanga bruo..........
En mateno oni povas ja konstati
Per radsignoj kaj malordaj piedspuroj,
Ke trapasis miloj da soldatoj fronten.

Iun tagon enpuŝiĝas flama tajdo
Kun kanajloj brut-sovaĝaj kaj kruelaj
Laŭ ĉi tiu grandioza arterio ——
La ŝoseo pavimita per la sango
De la junaj pioniroj frumortintaj.
Kuras sur ĝi kirasaŭtoj kaj ĉevaloj!
Poste ili ĉie dissemadas flamojn;
Kaj bruligas la kabanojn, murdas homojn,
La gapatrojn kaj gefratojn senkompate.
Kuŝas sur radsignoj hirte plektiĝintaj
Nud-kadavroj de l' fratinoj perfortitaj.
En profundo de radsignoj jam plenplenas
Sangaj larmoj de la fratoj insultitaj.

Sed la tajdo estas fine repuŝita!
(Ke ĝi forsekiĝu iam poreterne!)
Vilaĝanoj jen forviŝas de la vangoj

Larmojn kaj akceptas kun intima varmo
La dekreton de la fratoj niaj propraj:
"Prenu ree la pioĉon
Kaj elturnu la ŝoseon!"

IV

"Kial ni elturnu la ŝoseon bonan?
Kial devas ni detrui la ŝoseon
Pavimitan per la ŝvito-sango nia?"
Pro la tajdo bruliganta nian haŭton!
Kiu ja dezirus vidi dento-radajn signojn
De la tankoj kaj hufspurojn de l' kanajloj
Sur la vojsurfaco multe ensorbintan
Nian sangon la subliman kaj martiran?"

Jen denove komenciĝas la laboro:
Granda nombro de geviroj maljunaĝaj
(La junuloj jam foriris soldatiĝi!)
Sian restan energion alkroĉigas
Al malamo furioza kaj indigna.
Fluas ree sang' fatala de la korpoj!
Kiom da personoj verŝas ja denove
Larmojn funebrantajn pri l' viktimoj novaj!
Frap' post frapo la pioĉoj elturnadas
Tertavolon rezistantan kun obstino.
Oni portas foren pezajn koton, ŝtonon,
Baraktante tage kontraŭ l' arda suno,
Aŭ malvarma pluvo sen adekvata ŝirmo.
Nokte oni trinkas roson malvarmigan,
Luktas kun ĝisoste pika frosta vento.
Oni devas nutri sin per krudaj manĝoj.
Nun suferoj doloriĝas pli ol iam.
Jen, rifardu! Homo post la hom' oferas
Siajn lastajn jarojn de kaduka korpo
En abismon de labora baraktado.
Ili ja akceptas la doloron mute,
Subfosante vojsurfacon en montaro!
Ili alrigardas stulte la ŝoseon,
Kie kuris iam veturiloj are,
Kie ja stampiĝis plandoj krude larĝaj
De la kamparanoj, kiuj transportadas
Agrajn produktaĵojn kun benita ĝojo.
Ve, nun ili nur eltiras pezan ĝemon!
Tamen kiam ajn konsolas oni ilin
Pri doloro, kian ili suferadas,
Ili nur respondas per spitema tono:
"Ni ne povas ja toleri la kanajlojn
Treti la ŝoseon de ni konstruitan!"

*Elĉiniĝis Elpin.*

# Pledo por Armila Embargo

Unu el la usonaj organizoj kiuj aktive klopodas por armila embargo kontraŭ Japanio fare de Usono estas la Usona Asocio por Helpo al Malsatego k Superakvo en Ĉinio en Chicago. La asocion estras S-ro Wirt W. Hallam, 70-jara socia laboranto k elstara civilula gvidanto en tiu urbo.

En cirkulero eldonita en marto, la asocio de S-ro Hallam atentigas per la trafa demando: "Kial Armi la Nacion Kiu Nin Prirabas?" Ĝi esprimis sian fortan malkonsenton al iuj tagĵurnaloj kiuj urĝis Usonon "zorgi pri nia propra negoco", "ne kolerigi Japanion"——"Japanio estas bona kliento, aĉetas US$200,000,000 pojare el Usono".

Ciferoj de la Usona Registaro estis cititaj por montri ke vendaĵoj al Japanio dum la pasintaj kvin jaroj entute valoris US$1,146,000,000 aŭ malpli ol US$250,000,000 pojare. Privataj taksoj indikas ke pormilitaj provizaĵoj k materialoj estis pli ol duono de la sumo, aŭ almenaŭ US$600,000,000.

Kiel rekta sekvo de tiuj vendoj, la cirkulero rimarkigis:

Usonaj preĝejoj, hospitaloj, ktp.,
fakte perditaj taksiĝis je......US$ 50,000,000

Usonaj komercaj investoj
fakte perditaj taksiĝis je......US$250,000,000

Usona negoco kun Ĉinio reduktita dum pasintaj kvin jaroj k estontaj kvin jaroj taksiĝis je almenaŭ US$100,000 pojare (US$137,000,000 en 1928; US$38,000,000 en 1935)..US$1,000,000,000

Usona pacifika marborda defendo necesigita de japana uzo de militmaterialo vendita al ili de usonanoj eble kostos multe pli ol ..........US$1,200,000,000

Entute ..........US$2,500,000,000

Alivorte klarigis la cirkulero, la mono kiun Usono ricevas el la vendo de milit-provizaĵoj kostas al la usonanoj po pli ol US$25 por US$6 ricevitaj, k "povos kosti al ni multe pli en la estonto, se tio daŭros."

Registaraj taksoj pri militaj ekipaĵoj, kiaj militaj aeroplanoj, motor-ĉaroj, tankoj k municio, venditaj de usonanoj al Japanio en la pasintaj du jaroj, estis malpli ol US$12,000,000, "Se ni kalkulas sur tiu bazo, tio signifas ke po US$12 ricevitaj ni perdis US$2,500." (*A. V.*)

# Kion Ili Semis, Tion Ili Rikoltos

Norda Hupeh ĉi tie nomata aludas al la mallarĝe longa regiono inter la Tahung k Tungpa montaroj k la Tang k Hsiang riveroj.

Depost frua majo la malamiko komencis grandan ofensivon kontraŭ la Tangho areo en Norda Hupeh per tri kolonoj el Hsingyang, Hsihsien k Chunghsiang respektive, k la japana propagandata celo estis "forviŝi la ĉinan kampan armeon en Norda Hupeh." La batalfronto etendiĝis de Hsingyang, Singyang, Tangho, Singya, Hsiangyang ĝis Chunghsiang laŭ kurba linio de pli ol 500 kilometroj. Sekve, tio ĉi estis plej grandskala batalo depost la batalo ĉirkaŭ la Wuhan areo.

Dependante preskaŭ ekskluzive de perfektaj komuniklinioj k siaj mekanizitaj fortoj por sia rapida antaŭenpuŝiĝo, la malamiko sukcesis okupi nur kelkajn urbetojn laŭlonge de la ĉina ekstera defendlinio laŭ la Hsiang rivero k fine trovis sian planon enfermi la ĉinan armeon nerealigebla. Pro tio la malamikaj trupoj povis nur disen puŝiĝi, dum la ĉinaj trupoj plene utiligante la topografiajn avantaĝojn sukcese sieĝis preskaŭ ĉiujn malamikajn poziciojn k trupkoncentriĝojn k faradis tage k nokte surprizajn atakojn por ilin turmenti k konsumi.

La malamiko kun sia konsumita militforto ja ne kapablis subteni batallinion longan je pli ol 500 kilometroj. Sekve la malamika armeo en tiu regiono entute disfalis post malpli ol dusemajnaj operacioj. La longa batallinio rompiĝis en tri sekciojn k revenis al la antaŭbatala situacio. Sed komence de junio la malamiko, maltrankvila pri sia malvenko, ekkoncentrigis siajn trupojn ĉe Chunghsiang, transpasis perforte la Hsiang riveron k antaŭen marŝis laŭ la Hankow-Ichang landvojo direkte al Ichang, kiu estis fine okupita, per tio longigante la frontlinion je pliaj 150 kilometroj.

Kiam la malamiko estis ankoraŭ restanta en Norda Hupeh kun la freŝa memoro pri sia malvenko, ĝi transigis la kulpon al la civiluloj k provis kvietigi sian sangavidon per brutaj perfortoj kontraŭ ili. Sed la popolamasoj de Norda Hupeh, kvankam ne organizitaj k armitaj dum paca tempo, estas fame konataj por sia braveco. Anstataŭ lasi sin buĉi ili ekprenis ĉiajn eblajn batalilojn k kondukis heroajn luktojn kun la malamiko. Jene estas nur kelkaj el la epizodoj pri ilia heroa batalo kiujn la skribanto aŭdis ĉe la fronto:

Peiying estas vilaĝo nordoriente de Hsiangyang. Kiam du japanaj soldatoj alvenis por porko k koko, unu el ili estis mortbatita de la vilaĝanoj k la alia forkuris vundita. Lia raporto alvenigis al la sceno pli ol 200 japanajn soldatojn, kiuj tuj ekbruligis preskaŭ ĉiujn vilaĝdomojn. Pao-estro* Chang el proksima vilaĝo venis kun kelkaj kuraĝaj junuloj kaŝe armitaj per pistoloj k sukcesis alvoki la tutan vilaĝon al rezistado k mortigi plurajn malamikojn.

Ĉe Hoyang urbeto sur Honan-Hupeh limo unutage kuŝis senmove du malamikaj tankoj sur la landvojo. La malamikaj soldatoj prizorgantaj la du tankojn jam eliris por havigi per du vilaĝanoj akvon por purigi la tank-kirason je koto. La pordoj restis nefermitaj, k la du vilaĝanoj ŝajne obeeme farante la purigan laboron ĵetis serĉan rigardon en la du tankojn. Ili trovis maŝinajn pecojn envolvitajn en naztukoj. Nerimarkite ili forŝtelis ilin k kuregis en la tritikkampon. La du tankoj fine ne povis moviĝi pro la manko de la necesaj maŝinpecoj.

Luti Vilaĝo estas 5 kilometrojn norde de Tsaoyang. Vilaĝano Lu Kwe-shi jam okulvidis la japanajn perfortojn en la urbeto de Wangchiao. Lia indigno diktis al li agi por publika venĝo. Li sciiĝis pri la malamika situacio en tiu urbeto k nokte iutage li gvidis kelkdek kuraĝajn junulojn por ataki la japanan garnizonon. Parteto de la malamikaj soldatoj estis mortigitaj, sed la plej interesa estis tio, ke la japanaj soldatoj nenion distingante en la blinda mallumo ekbatalis inter si, k nur la morgaŭa krespusko vidigis al ili ke la mortigitoj estis plejparte japanaj soldatoj mem.

La loĝantaro de iu vilaĝo 7 kilometrojn norde de Tsaoyang sciiĝis pri la baldaŭa alveno de grupo da malamikaj soldatoj. Ili decidis ion fari por puni la malamikon. Ili preparis bonvenigan festenon por ili buĉante porkojn k kokojn. La malamikaj soldatoj fidis je la sincereco de la vilaĝanoj k metis laŭ ilia konsilo la pezajn armilojn ie ekster la vilaĝo por ĝui ripozon k la festenon en la vilaĝo. La embuskaj vilaĝanoj nerimarkite forportis k kaŝis ĉiujn tiujn pezajn armilojn inkluzive kanonojn k maŝinpafilojn kiujn la malamikoj lasis sengarde ekster la vilaĝo. Dume la vilaĝanoj interne de la vilaĝo daŭrigas la ŝajne fervoran preparon de la festeno. Fine la malamikoj ektrovis la foreston de la armiloj, k al iliaj demandoj la "gastigantoj" respondis eviteme. Kiam la japanaj soldatoj kuris ekster la vilaĝon por lokalizi la armilojn, la gastigantaj vilaĝanoj forportis rapideme la buĉitajn porkojn k kuregis ĉiuj en la direkton kontraŭan al tiu en kiu kuris la japanaj soldatoj. La vilaĝanoj gajnis senkoste la pezajn armilojn k regalis sin per la preparita festeno. La japanoj revenis nur por vidi senhoman vilaĝeton.

La popolamasoj de Norda Hupeh jam konis la japanan brutecon k decidis ilin puni kiam ajn eble. K se la japanoj venos jam denove al tiuj lokoj, ili trovos ke el iliaj majaj semoj de malamo jam elkreskis fortikaj trunkoj kiunj la popolamasoj uzos kiel mortigajn batalilojn kontraŭ la japanaj semintoj.

(Tradukis A. Verd)

---

*Pao estas dugrada unuo de ĉina popola organizo konsistanta el 100 familioj.

# Gvidanto de Kripligitaj Soldatoj

Iu interesa figuro ĉe la Dua Jarkunveno de la Ĉinaj Industriaj Kooperativoj okazinta en Chungking en julio ĉi-jare estis "J.J.", kiu prizorgas 2,000 kripligitajn soldatojn nun aŭ en kooperativoj aŭ sub trejnado por kooperativa laboro. J.J. estas grizhara sed fortika k eltenema kiel bovpaŝta bubo. Je sia aĝo de 60 jaroj li havas la saman apetiton k la saman amon al eksterporda vivo kian li havis je sia 16 jara aĝo; cent-li'a marŝo k kvin manĝoj ĉiutage estas ankoraŭ lia ideo pri bona tago.

"Ofte necesas nur psikologia reĝustigo por transformi la tatan vivon de kripligita soldato", diras J.J. "En Shanghai mi laboris je multaj homoj kiuj volis nur sinmortigi kiam ili rekonsciiĝante trovis la foreston de unu sia kruro, sed post kelkaj semajnoj ili ekvolis denove fariĝi utila membro de la socio k fari la plej bonan aferon kun artefarita kruro."

Kune kun fremda doktoro k iuj kolegoj de similaj idealoj, J.J. laboris pli ol unu jaron redonante al la kripligitaj soldatoj de Shanghai ilian normalan formon korpan k mensan, k al li ankaŭ ŝuldis la revenigo al socio de ĉirkaŭ 500 homoj k ilia sekura transporto interlanden. Poste, kiam fornaĝis la tujaj influoj de la Shanghai batalo, lia sperto kiel edukanto de kripligitaj soldatoj diktis al li partopreni en la Ĉ.I.K. laboro, k li sekvis siajn malnovajn protektatojn al iliaj novaj hejmoj en libera Ĉinio. J.J. ne forgesos la bonvenigon kiun li ricevis de tiuj homoj kiam li alvenis al ilia centro en Kiangsi, aŭ sian propran fieron k senton de sukceso kiam li trovis ke multaj el ili nun sin subtenas en kooperativoj k jam laŭas edzinojn kiuj estas ankaŭ kooperativaj membroj. Pli poste disvastiĝis la onidiro ke Rewi Alley, kiu estis regula vizitanto al la hejmo de kripligitaj soldatoj en Shanghai, nun konsilisto al Ĉ.I.K., estis venanta al la loko. La kripligitaj kooperantoj sendis ĉiutage serĉantojn al ĉiu ebla enirejo por lin deteni k eskorti al la tendaro.

En tiu ĉi loko la Ĉ.I.K. havas 14 kooperativojn, kun 483 kripligitaj membroj, kapitalo de $30,000 k produktaĵoj de cigaredoj, sapo, presado, ledo, ŝtrumpoj, hospital-provizaĵoj, vestaĵoj, alkoholo, oro, ŝuoj, k riparitaj bicikloj, valorantaj $30,000 pomonate. Granda kurso estas kondukata por instrui pri kooperativa praktiko k teorio, alia kurso pri kooperativa librotenado estas ĵus kompletigita, k novaj kooperativoj estas organizitaj por ĉirkaŭ 1,000 membroj kun kapitalo de $80,000.

Ĉe alia loko en la sudorienta regiono funkcias ses kriplulaj kooperativoj dum en la nordokcidenta regiono estas kvar, kun ĉirkaŭ 150 membroj, k en la sudokcidento estas proksimume 100 kooperativoj por kripluloj kiuj faras sulfuron, ŝtrumpojn k vestaĵojn.

La unua kooperativo por kripligitaj soldatoj komencis laboron en Kiangsi je januaro 22, 1939, kun kapitalo de $3,300 k 23 membroj. Tiujn ĉi trejnis tri kapablaj kripluloj konataj kiel "La Tri Musketistoj", kiuj estis malnovaj amikoj de J.J. en Shanghai.

Cigared-kooperativoj de kripligitaj soldatoj havis mizeran komencon. Manko de taŭga vendisto lasis la kooperativon kun granda stoko sen aĉetanto, multo da kiu fariĝis ŝimá, la teknikistoj ne estis efikaj k la prezidanto ne fidinda. Sed la membroj decidis fari sukceson el ĝi, k fine de la unua jaro unu kooperativo faris netan profiton de $2,468.39, dum brile kolorigitaj anoncoj de la "Kriplula Marko" k la "Aero-Marko" estis bone konataj tra la tuta distrikto, kiuj favore efikis al la vendado de ĉiuj tiuj kooperativoj. Alia kripl-soldata kooperativo en la sudoriento liveras plejparton el la bandaĝoj k disinfekta kotono uzata en Sud-Kiangsi Baz-hospitalo; tiu ĉi kooperativo havas 44 membrojn k $3,500 da kapitalo; en 1939 ĝi faris netan profiton de $1,031.38.

En frua 1940, la Ĉina Ruĝa Kruco invitis J.J. al Kweiyang por trejni la kripligitajn soldatojn tieajn por industria-kooperativa laboro. Tio ĉi estas prova komenco, k J.J. esperas ke kiam li pruvos siajn teoriojn pri kripligitaj soldatoj ambaŭ praktikaj k idealaj, ili estos adoptataj tra la tuta lando. Jam estas kvar kooperativaj grupoj laborantaj en Kweiyang. Unu el la kripluloj kiuj insistis veni kun J.J. al Kweiyang eĉ preferante la oferon de sia pensio (kiun oni povis pagi nur en Kiangsi) estas nun transportisto por la Ruĝa Kruco, k glorigis sin per sia eltrovo de novaj vojoj por medikamentaj provizaĵoj.

Milojn da mejloj norde, en montkavo, loĝas kooperativa sekretario Leŭtenanto T. de la fama 37a divizio de Chi Hsing-wen. Leŭtenanto T. vundiĝis en sep lokoj ĉe Lukoŭĉiao je julio 8, 1937. Irante dolorplene sian vojon de hospitalo al hospitalo laŭ la Pinghan k Lunghai fervojoj, li alvenis post unu jaro al Paochi. Kun li estis lia amiko, An Pingyeng, ankaŭ vundita. Malaktiveco ĉagrenis ilin ambaŭ. An havis precipe inventeman menson. Dum ses monatoj ili faris eksperimentojn je sia propra elspezo en sapfarado el lokaj krudmaterialoj, k je feb. 1, 1940, laboro komenciĝis kiel kooperativo faranta sapon, notpaperon, braz-lavujojn, k ŝtampojn. Ĉiutaga produkto estas 6 kestoj da sapo valorantaj po $36, dekduo da lavujoj gravuritaj per la inskripcioj "Laboru Kune" k "Venko-Kooperativa Produkto" k nedifinita kvanto da ŝtampoj k papero.

# LA "POSTPORDO" DE ĈINIO

La fermo de la Franca Hindo-Ĉinia vojo k la dumtempa blokado de la Birma linio devigas al Ĉinio dependi pli peze de sia nordokcidenta internacia vojo. Granda nombro da ŝarĝaŭtoj estas asignitaj al tiu ĉi vojo por refortigi la transportan kapablon de pli ol 1,000 pezaj ŝarĝaŭtoj. K novaj vojoj estas rapide kompletigataj por plenumi la urĝan bezonon.

La nordokcidenta "postpordo" de Ĉinio, kiu kondukas al Sovetio k de tie al la ekstera mondo, estas en Sinkiang, ankaŭ konata kiel Ĉina Turkestano.

La ĉefa arterio de la nordokcidenta internacia vojo estas la 1,172-kilometra Kansu - Sinkiang landvojo kondukanta de Lanchow, ĉefurbo de Kansu provinco, al la Baboon Pasejo sur la Kansu-Sinkiang limo. Varoj por Sovetio estas transportataj al tiu ĉi pasejo per ŝarĝaŭtoj de la Nordokcidenta Landvoja Administracio de la Ministerio de Komunikado k poste al la ĉina-sovetia landlimo per Sinkiang-provincaj ŝarĝaŭtoj.

La Kansu-Sinkiang vojo estis unue sekcio de la pli ol 2,500-kilometra Shensi - Sinkiang vojo konstruita de Markizo Tso Tsungtang dum sia kampanjo kontraŭ la granda Mahometana Ribelo dum 1862-1877. Sur la orienta sekcio de la imperia vojo estis konstruita la 704-kilometra Sian-Lanchow landvojo depost 1930. Ĝia okcidenta sekcio de 1,172 kilometroj de Lanchow al la Baboon Pasejo estis modernigita en 1938 por doni al milittempa Ĉinio elirejon sur ties nordokcidenta landlimo.

La konstruo de moderna landvojo kunliganta Kansu k Sinkiang estis planita en 1935, sed aktuala laboro fariĝis nur post la komenco de la milito. Fine de 1937, grandaj nombroj da ŝarĝaŭtoj enŝutiĝis el ekstere, k la malnovan imperian vojon oni trovis netaŭga por tia peza trafiko.

Ĉirkaŭ 20,000 homoj, plejparte soldatoj garnizonantaj la Hoshi (okcidente de la Flava Rivero) distrikton, mobiliziĝis por ripari la malnovan imperian vojon por akomodi aŭto-trafikon post la kompletiĝo de nova moderna landvojo. Tiu ĉi parto estis kompletigita en marto, 1938, je la kosto de $538,908. Tuj poste, laboro sur la nova Kansu-Sinkiang landvojo komenciĝis en aprilo per ĉirkaŭ 100,000 laborantoj, soldatoj k civiluloj, viroj k virinoj. Je la kosto de $761,092, la nova landvojo, kun 100 pontoj el kunigita longeco de 1,940 metroj, estis malfermita al trafiko ĉe la fino de la jaro, kvankam partoj de la vojo k kelkaj el la pli grandaj pontoj ne estis kompletigitaj ĝis la somero de 1939.

De Lanchow la vojo estas konektita kun Sian per la 704-kilometra Sian-Lanchow landvojo. Ĉe la altaĵo de Huachialin, la vojo branĉiĝas k sekvas mallongigitan linion al Tiensui k poste Shuanshihpu en sudokcidenta Shensi. La tuta distanco de Lanchow al Shuanshihpu estas 575 kilmetroj. Ĉe Shuanshihpu, la vojo iras suden sekvante la landvojon al Ningchiang 250 kilmetrojn fore.

De Ningchiang, ĝi konektiĝas kun la Shensi-Szechuan landvojo al Chengtu 440 kilometrojn fore. De Chengtu, la 450-kilometra Chungking-Chengtu landvojo kondukas al la nacia milittempa ĉefurbo.

Tiele, la ĉina nordokcidenta internacia vojo de Chungking al Baboon Pasejo estas 2,886 kilometroj tra Shuanshihpu k Huachialin. De Baboon Pasejo al la ĉina-sovetia landlima urbo de Tacheng estas ĉirkaŭ 2,020 kilometroj. La tuta distanco de Chungking al la ĉina-sovetia landlimo estas ĉirkaŭ 4,900 kilometroj.

Por mallongigi la distancon, Ĉina Ministerio de Komunikado rapidigas la kompletigon de la 1,119-kilometra Kansu - Szechuan landvojo kondukanta rekte de Lanchow al Chengtu mallangigante la 1,400-metre altan Motienlin (Ĉiel-tuŝa) montcenon. Tiu ĉi vojo, post sia kompletiĝo en 1940, mallongigos la distancon de Chungking al Lanchow, 1,713 kilometrojn tra Ningchiang, Shuanshihpu k Tiensui, je 146 kilometroj. (*Mincz*)

## DANKE NI KVITANCAS

| | | |
|---|---|---|
| 84. | S-ano Thure Litzen (Usono) | r. k. 2 |
| 85. | S-ano A. S. Mellichamp (Usono) | r. k. 1 |
| 86. | S-ano G. Holmkvist (Svedio) | r. k. 2 |
| 87. | S-ano Fred Arch (Aŭstralio) | Ĉ $ 23.93 |
| 88. | S-ano Allan C. Shain (Aŭstralio) | Ĉ $ 43.99 |

(inkluzive 3 aŭstraliajn ŝilingojn donacitajn de F-no C. Paris, k 2 aŭst. ŝil. donacitajn de S-ro Mancey.)

---

Kiam li observis la sap-pecojn gliti en la ŝtamp-maŝinon k denove elgliti inskripciitaj per "Venko-sapo", iu vizitanto senkonscie resumis la idealon de J.J. por kripl-soldataj kooperativoj tra la tuta lando. "La venko ĉi tie temata estas ne nur tiu de Ĉinio super la malamiko", li diris, penseme, "sed ankaŭ de sana animo super kripligita korpo, de homa klopodo super malhumana detruo."

(*A. Verul*)